

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JUNIO 2005

ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA

Previa convocatoria de la Presidenta se celebró el pasado día 31 de mayo una Asamblea General Extraordinaria para adaptar los estatutos de la Asociación a la actual Ley de Asociaciones. Se aprobó el cambio del artículo 34 que quedó redactado como sigue: “Lo no previsto en los Estatutos se regirá por la Ley Orgánica 1/2002 de 22 de marzo”

HISPANIO

Kataluna Esperanto-Asocio eldonis datenan diskon kun riĉa enhavo, kiun ĝi prezentis en E-budo okaze de la Tago de la Libro (Sant Jordi) en la Ramblas de Barcelono.

En RNE oni povis auskulti muzik-elsendon ekde varsovia preĝejo kiu komenciĝis ĝuste per "La Espero" de Koszewski. Temis pri 9 minuta kantato por du korusoj, "a capella". La hispana parolistino emfazis ke temas pri verko en Esperanto.

RESTARIGO DE HISPANA SEKCIO DE ILEI

Kelkaj hispanaj esperantistoj deziras denove rekrei la hispanan sekcion de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Oni petas ĉiujn kiuj havas intereson, aliĝi tiel rapide kiel eble por antaŭenigi tiun projekton. La kotizo por Hispanio estas EUR 18,00, se la membro deziras ricevi la revuon IPR papere kaj EUR 4,00 se rete. La pagojn oni povas fari al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ rekte al la kasisto. Pliajn informojn

<http://www.ilei.info> aŭ augustocasquero@hotmail.com

4-A CENTIARIĜO DE “EL QUIJOTE”

La Ministerio pri Kulturo aljuĝis al HEF monhelpon de 3000 eŭroj por la disvolvigo de la Projekto Kihoto 2005. La afero ne iĝos definitiva ĝis HEF prezentos kelkajn mankantajn dokumentojn sur kiuj, kompreneble, ni jam laboradas. Oni volas gratuli al Toño del Barrio, sen kies persisto probable HEF jam delonge rezignintus pri tiaj burokrataĵoj.

HEF estas rajtigita fare de la Comisión del 4º Centenario uzi la oficialan logoon de la 4ª Centariĝo. La logoo jam ornamas HEF-paĝarojn.

En la retejo de la Instituto Cervantes http://www.cervantes.es/quijote_2005/ estas virtuala ekspozicio pri tradukoj de Quijote. En ĝi aperas esperanta versio kun iom fuŝa skanado de la unua ĉapitro: http://www.cervantes.es/quijote_2005/esperanto/esperanto.pdf

La senpaga ĵurnalo de Guadalajara “Henares al día” publikigas tutpaĝan artikolon de Lupe Sanz laŭ la titolo “Dos Quijotes alcarreños”. Temas pri la esperanta versio de F. de Diego kaj la versio en “latín macarrónico” de I. Calvo; ambaŭ tradukistoj naskiĝis en Guadalajara.

En la Centro Cultural José Espronceda de Madrido, Toño del Barrio, Direktoro de Fundación Esperanto, parolis la 30-an de majo pri “Las traducciones de El Quijote al Esperanto”

NOVA LIBRO

“El hombre que desafió a Babel”

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. La prezo de la libro estas 20 eŭroj sed por vendoj ĜIS KAJ DUM la HEF-Kongreso, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferton:

po 23 eŭroj vi ricevos **“El hombre que desafió a Babel”** kaj **“Nuevo Método de Esperanto”**; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

VOJAĜO AL UK DE VILNIUS Informoj augustocasquero@hotmail.com

Eliro la 19-an de julio je la 18,30 ekde Valencia pere de regula internacia buso. Post 46 horoj alveno al Bydgoszcz (Pollando) la jaŭdon je la 16.20. Du noktoj en Bydgoszcz. Sabaton 23-an je la 05.00 vojaĝo en aŭtobuso de Monda Turismo Esperanto al Vilnius (17.00). Loĝado en Vilnius en trilitaj ĉambroj. Prezo: 510 eŭroj plus du noktoj Bydgoszcz (6-12 eŭroj po nokto). Ankaŭ inkludas ekskursojn en Litovio (unu tuttaga al diversaj urboj de Litovio, vizito al Vilnius, kaj ekskurso al la fermo de la kongreso en Kaunas). Oni revenos, ekde Pollando, la dimanĉon 31-an de julio por atingi Valencion la 2-an de aŭgusto nokte. Oni povas resti pliajn tagojn en Pollando. La vojaĝo estas tro peza, nur por kuraĝuloj.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaŭde vespere (18,30-21,00h), dum aliaj tagoj vi povas faksi au telefoni al 91 446 80 79 au kontakti rete admin@esperanto-es.net

Multfoje ni jam diris ke la ekonomio de HEF estas malbona sed nun estas terure malbona ĉar la mon-kaso de HEF kaj de la Kongreso estis ŝtelita kaj malaperis pli ol 500 eŭroj. La ŝtelisto eniris en la oficejo per ŝlosilo ĉar la pordo ne suferis malutilon. Post kontrolo de la bienoj de HEF kaj MEL nenio pli malaperis aparte de la mono.

La programo ĉe Ateneo de Madrid daŭrigis en majo kun la prelego de Juan del Castillo "Ludoj ĉiam, ĉie".

7/10 julio Alcalá de Henares, **64^a Hispana Kongreso de Esperanto**. Kongresejo: Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca. Plza. de San Julián, 1. Alcalá de Henares. Tre centra loko, proksime de "Plaza de Cervantes".

Pli da informoj pri la kongreso ĉe: <http://www.esperanto-es.net/congreso2005/>

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Dum junio ankaŭ niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3^o-7 Tel. 91 446 80 79.

10 –an de junio je la 19,00 h Ateneo de Madrid (c/ Prado 21) prezentado de la poemaroj de Jorge Camacho.

17 ĝis 19 de junio en GUADALAJARA "Maratón de cuentos", ni partoprenos per la rakonto "La feino" kaj ankaŭ kun budo por montri kaj vendi niajn librojn.

Ŝi ŝerce serĉas ŝancon sorĉan

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3^o-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid,

NOVA KONTO

Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4^oB EXT

28005 Madrid